

Radio Ĉerizo 16

komenco

Jam pasis pli ol dek(10) tagoj post la komenco de la nova jaro dumil cent dek du(2012). En japanio la unua monato de la jaro estas nomata "ŝoogacu" 正月 aŭ respekte "o-ŝoogacu" お正月, kaj okazas multaj ceremonioj kaj eventoj tutlande aŭ laŭ regionoj.

Precipe la unua afero aŭ okazaĵo estas bonvena kaj gratulinda. Pro tio japana lingvo havas esprimojn "hacu-" 初 kiel prefikso, kaj "-zome" aŭ "-some" 初め kiel sufikso, uzataj en la sencoj "la unua", "la unuafoja", "komenca" kaj "komenco de io".

Mi citos kelkajn esprimojn kun prefikson "hacu-" 初:

1 "Hacu-hinode" 初日の出 - la unua sunleviĝo en la nova jaro. Oni ofte preĝas al ĝi sur montosupro. Se nebulas aŭ pluvas, oni tre bedaŭras, ke ili ne povas vidi la unuan sunleviĝon "hacu-hinode" 初日の出.

2 "Hacu-jume" 初夢 - la unua sonĝo de novjaro. Tradicie la gratulindaj sonĝoj estas, unue Monto Huĝi, due falko, kaj trie melongeno.

3 "Hacu-ŝigoto" 初仕事 - komenco de sia laboro en la jaro.

4 "Hacu-giku" 初菊 -

ekfloriĝo de krizantemo en la jaro.

5 "Hacu-juki" 初雪 - la unua neĝo en la jaro.

Jen esprimoj uzantajn sufikson "-zome" aŭ "-some" 初め:

6 "Kaki-zome" 書初め - la unua skribekzerca ceremonio en la jaro. Ankaŭ junaj geknaboj prenas penikojn kun tuĉo en sia mano, kaj skribas esperajn vortojn por la nova jaro sur japanpapero.

7 "De-zome" 出初め - eklabora ceremonio de fajroficistaj bandoj, montrante konkurse rapidan fajrestingon kaj eĉ dangĝerajn akrobatajn dancojn sur altaj eskaloj.

8 "Mai-zome" 舞初め estas la unua danco antaŭ majstro.

9 "Ŭarai-zome" 笑い初め estas la unua rido en la jaro.

10 En la senco de komenco "mi-some" 見初め - ekamiĝo; tamen ĉi tio okazas ĉiam en jaro.

Nun vi posedas sufiĉan scion, kiel valoraj estas "komencoj" al japanoj, laŭ tradicia vidpunkto. Progresas moderniĝo tago-post-tage, sed ĉi tiuj vortoj restos inter ni longe. Kiel komenciĝis nova jaro en via lando?

Radio Ĉerizo finas ĉi-fojan elsendon. Do, ĝis reaŭdo!

Sistemo de latinigo

<i>esp-a prononco</i>	<i>novjapana sistemo</i>
<i>registara sistemo</i>	<i>hebona sistemo</i>
<i>higagana</i>	<i>ĉina ideogramo</i>

ŝoogacu	syôgacu
syôgatu	shogatsu
しょうがつ	正月

hacu	hacu
hatu	hatsu
はつ	初

jume	yume
yume	yume
ゆめ	夢

ŝigoto	sigoto
sigoto	shigoto
しごと	仕事

juki	yuki
yuki	yuki
ゆき	雪

Ŭarai	Warai
Warai	Warai
わらい	笑い
